


LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO“

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
 ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 1,50 NED. GULDENO AŬ EGALVALORO.

Por progresintoj.

NE ESTAS SAMAJ ĈIUJ ESKIMOJ.

(El „Tridek jarojn en la ora nordo“ de Jan Welzl).

Vojaĝante en Alasko, kie mi estis tre ofte, same kiel en Kanado, mi konatiĝis ankaŭ kun alaskaj eskimoj, kiuj estas preskaŭ la malo de niaj arktaj Eskimoj. La alaskaj Eskimoj estas puraj, ili surmetas purajn vestojn, preĉipe se ili loĝas en urboj aŭ proksime al ili, ja eĉ grandaj riĉuloj estas inter ili. Ili havas ekzemple tutajn aregojn da boacoj (= nordaj cervoj), kiujn ili vendas centope al buĉejoj. Krom tio ili komercas, same kiel blankuloj, kaj vendas kaj aĉetas ne nur interŝanĝe, sed ankaŭ je kontanta mono. Alaskaj eskiminoj vestas sin hodiaŭ plejparte jam same, kiel la blankulinoj, ili portas mallongajn jupojn, modernajn ŝuetojn, kelkaj havas jam ĉe tonditajn harojn. Kompreneble de viaj virinoj ili diferencas ne nur per la koloro, sed ankaŭ per la tatuadoj sub la malsupra lipo. En tiuj regionoj estas la raso jam konsiderinde miksitaj; multaj virinoj aspektas jam kiel mestizaj (= mikstrasaj) fininoj. Tre multaj studas en diversaj institutoj kaj fariĝas instruistinoj, kiuj instruas ne nur eskimajn infanojn, sed ankaŭ infanojn de blankaj orfosistoj. La lernejoj estas privataj kaj la orfosistoj subtenas ilin abunde. Mi konis kelkajn Kanadanojn kaj Aŭstralianojn, kiuj donacis al tiaj lernejoj poŝtare eĉ 10.000 dolarojn.

Krom ĉi tiuj popolaj lernejoj havas la Eskimoj ankoraŭ pli altajn

kaj diversajn fakajn lernejojn. La virinoj lernas en ili kuiri kaj kudri kaj, kiam tia knabino venas hejmen el la lernejo, ŝi neniam plu surmetas naciajn vestojn, sed preferas servi ie al orfosisto, kuiri al li, kaj eventuale fariĝi lia amatino.

Mi vidis eĉ honorindajn eskimajn familiojn, kies filinoj havis hejme diversajn muzikilojn, ja eĉ fortepianon. Kaj tiam mi diris al mi, ke efektive estas tro granda diferenco inter niaj Eskimoj kaj tiuj en Alasko.

Mi tre ŝatis rigardi ĉi tiujn homojn precipe okaze de la amerika nacia festo, la 4-an de julio. Ĉi tiun tagon eliras aro da knabinoj, kiuj havas tir-harmonikojn kaj ludas je ili tute bone. Tio estas orkestro, kiu marŝas tien kaj reen kaj ludas senĉese. Viroj aliĝas al la knabinoj, oni marŝas tra la stratoj kaj poste komenciĝas ludoj, dum kiuj nun viroj prezentas, kion ili scipovas. Mi vidis ekzemple okaze de tiaj festoj Eskimojn salti trans ŝnuron helpe de stango. Tia homo ekkuris kaj saltis trans ŝnuron streĉitan preskaŭ kvar metrojn super la tero. Aŭ ili prezentas diversajn spektaklojn en siaj boatoj nomataj „kajakoj”.

Eskimo retiriĝas en kajakon, kvazaŭ li volus pafi je lutroj. Li estas vestita per akvorezista surtuto el balena stomako kaj subite li komencas turniĝi en sia kajako. Kelka turnas sin en tiu boato tiel rapide, ke li ne kapablas ekhalti kaj, kiam li renversiĝas, li restas pendanta per la kapo malsupren en la akvo. Sed rigardantoj zorgas pri tio, ke ne okazu akcidento kaj helpas tian kompartindulon.

Alia ludo estas pli interesa. Eskimo ĵetas per man-harpunoj al kaŭĉukaj pilketoj), kiujn blankuloj ĵetas en la akvon. Tio okazas tre rapide: unu-du! Tuj kiam pilketo falas sur la akvon, jam harpuno devas trapiki ĝin. Tio signifas, ke en la sama momento, kiam la blankulo ĵetas la pilketon, la Eskimo ĵetas sian harpunon. Sed tio ne estas ankoraŭ ĉio. Estas memkompreneble, ke ĉiuj ĉi ludoj okazas je vetoj, ĉe kiuj la vetperistoj konsiderinde gajnas, do la vetantaj blankuloj indikas al la Eskimo, en kiu pozo li atehdu la ĵetatan pilketon. Ekzemple li devas stari antaŭen klinita sur sia renversebla kajako aŭ kaŭre sidi, aliaj volas, ke li staru supre je la rando de la boato, aliaj postulas laŭŝajne neeban agon nome, ke li staru sur la antaŭo aŭ sur la malantaŭo de la kajako; tio estas plej malfacila kaj regule falas la eskimo en la akvon kune kun sia kajako.

Plue okazas bokso sur la akvo. Du eskimoj veturas en kajakoj,

unu kontraŭ la alia. Ili veturas rapide kaj en la momento, kiam ili renkontiĝas, ili ekboksas. Ne gravas la forto de la batoj, sed ilia nombro. La arbitraciuloj kalkulas precize kaj la venkinto estas tiu, kiu donis plej multe da batoj. Ĉe la renkontiĝo oni kapablas doni plej multe sep ĝis ok batojn. Ekzistas homoj, kiuj faras tion tre bone kaj rapide. Sed okazas ankaŭ multaj skandaloj dum ĉi tiu ludo, ĉar subite oni ekkonas, ke tiu aŭ alia boksisto estas koruptita, kaj tiuokaze la amuzo kaj la vetludo tuj finiĝas.

Interesaj estas ludoj kun boacoj jungitaj al veturileto. La besto estas tiel dresita, ke ĝi prefere falas, ol haltas dum la vetkuro, kaj tiamaniere multaj bestoj estas mortpelataj. Tial oni malpermesis ĉi tiujn ludojn dum kelka tempo, sed pli poste oni denove permesis ilin. La vetkurejo, ekipita aparte por ĉi tiu celo, estis sur sablejo kaj tundroj inter Nome kaj Teller. Unu tia vetkuro okazis eĉ je distanco de dudek kilometroj kaj la intereso estis grandega. Ĝuste tiam estis mortpelataj boacoj, el kiu cirkonstanco rezultis skandalo.

Kompreneble okazas ofte dum tiaj ludoj, ke ekestas disputoj kaj interpafado, sed tio apartenas jam al tiu plezuro.

MI VIDIS IAM.

Mi vidis iam sur la strat'
Du mizerulojn en malsat',
Li ebria kiel besto,
Ŝi pala, kun ĉifona vesto;
Malĝojis mia kor'.

Kaj pri milito aŭdis mi,
Pri hombuĉad', epidemi',
Pri laboristoj mortigantaj,
Kaj pri gepatroj suferantaj:
Ho, ploris mia kor'.

Rigardis mi sur la kampar'
Al vilaĝana infanar',
Plektanta kronojn el lekantoj,
Dancanta je tre gajaj kantoj;
Nun ĝojis mia kor'.

Kunvenis junulara rond'
El ĉiuj partoj de la mond',
Unu alian komprenanta
Ĉar Esperanton parolanta:
Gojegis mia kor'.

Ho, firme do decidu ni
Ke ĉiu ano inter ni
Fariĝu forta batalanto
Por pac', justec' kaj Esperanto
Kun ĝojo en la kor'.

DANKON!

Pro la persona helpo de la prez. de la Flandra Esp. Ligo, s-ro Cortvriend, 36 nederlandaj TJO-anoj povis partopreni la TJO-konferencon en Belgujo. La estraro de TJO dankas s-ron Cortvriend pro lia fido en TJO kaj ankaŭ nome de la partoprenintoj ni dankas lin, ĉar nun pro lia helpo ili ĉeestis la unuan postmilitan internacian Esperanto-kunvenon. M. v. d. Horst.

NIA TUTMONDA FAMILIO

..... De la 22-a de septembro de la pasinta jaro mi estas katolika pastro, aŭ sacerdoto. Kaj nun mi jam estas sur mia posteno en la „batalkampoj” kiel Vikario de la paroĥo de la urbo Goja (provinco kaj eparkio Corrientes, Argentino).

Kiel ĵus konsekrita sacerdoto mi faris mian Unuan Sanktan Meson esperantistece kaj por Esperantistoj kun prediko en Esperanto kaj poste hispanlingva resumo de la sama prediko. Ambaŭ okazintaĵoj estis vaste diskonigitaj per ĵurnaloj kaj radiostacioj en- kaj eksterlandaj. Okaze de mia konsekriĝo mi ricevis esperantlingvajn gratulleterojn el 15 landoj el Sud-, Centro- kaj Nord-Ameriko, Eŭropo kaj Aŭstralio. Mi presigis specialajn memorbiletajn tiokaze. Ĉiuj diris, ke estas unika okazintaĵo en la tuta mondo, ĉar mi ankaŭ estas ankoraŭ juna, 25-jara, sacerdoto. Nacie mi estas polo, sed estante nur 4-jaruleto mi enmigris, kune kun mia familio, en Argentinon.

..... Eble ankaŭ interesos vin havi sciigojn pri la vojaĝo de pastro Kao. Li finis sian vojaĝon tra la tuta latina Ameriko en Meksiko je la fino de la antaŭa jaro. En ĉiuj landoj li disvolvis ampleksan programon de intervjuoj. Ĉie li vizitis lokajn Esperantosocietojn. En Brazilo, kie nia movado estas tre forta kaj vasta, li estis afable gastigata, kaj en Rio de Janeiro li faris paroladon en Esperanto pri Ĉinujo. En Argentino „A.E.K.A.” oferis bankedon honore al li ĉe la Ĉina Restoracio „La Pagodo”.

Ĉie li faris prelegojn, esperante kaj hispane. Li havis la okazon fari pli ol 280 konferencojn, 78 el ili estis disaŭdigataj de radiostacioj, en pli ol 20 Universitatoj kaj kulturaj organizoj. Li donis intervjuojn al pli ol 120 ĵurnaloj kaj gravaj revuoj. Li havis la honoron viziti la prezidantojn de pli ol 8 respublikoj kaj 11 ministrojn por Eksterlandaj Aferoj kaj konatiĝis kun multaj altegaj personoj de ĉiuj landoj. Li donis la Baptan Sakramenton al pli ol 70 ĉinoj en Peruo kaj Ekvadoro.

Li esperis en aprilo esti en sia misio en Senci.

Mi salutas ĉiujn membrojn de TJO kaj prezentas al ili mian simpation, Bruno Ostropolski, Casa Parroquial, Goya, Argentino, 4-6-46.

..... Kvankam en mia lando oni ne povas libere propagandi Esperanton, tamen je la 21a de aprilo oni surkampe festis la 3-an datrevenon de la E-rondo „La Vekiĝo”. Ĉeestis pli ol centoj da geesperantistoj.

Ĉirkaŭ la 16a komenciĝis la festo per hora kantado de nia „himno”; poste la Vekiĝanoj la unuan fojon kantis sian himnon „La Vekiĝo”, kiun la tuta ĉeestantaro kortuŝite aŭskultis. — Sekve José Marques bonvenigis la samideanaron kaj per mallonga parolado li priskribis la movadon en Barreiro ekde ĝis naskiĝo ĝis hodiaŭ. — Ĝi estas la kerno de la ĉi tiea junulara esperanto-movado!

José Marques, Barreiro, Portugalujo.

T.J.O.-RUBRIKO.

(Sokr. F. Meydam, Owenstr. 59, Leerdam, Ned).

Pro la ferioj kaj kelkaj personaj cirkonstancoj la TJO-estraro ĝis nun ne povis kunveni. Sekve de tio la raporto (kun starpunktoj kaj klarigoj de estraro kaj landaj sekcioj) pri la laborkunsido en Blankenberge aperos ĉu en la oktobra numero, ĉu en aparta eldono.

JARRAPORTO DE LA T.J.O.-FILMSERVO.

En la pasinta jaro la filmoj de T.J.O. estas montritaj i. a. en Hilversum, Roterdamo, Limmen, Noordscharwoude, Oosthuizen kaj West-Graafthijk.

Denove pruviĝis ke ili estas bonegaj propagandiloj! Multaj vidintoj aliĝis al T.J.O.

Ĉeferantoj el diversaj landoj petis sendi la filmojn al siaj landoj. Ni ne faris tion, ĉar ni timas, ke la filmoj perdiĝus.

Krom tio ĉe la Nederlanda landlimo ni devas pagi imposton pro importo kaj eksporto de „filmmaterialoj”.

Tial ni konsilis niajn eksterlandajn amikojn mendi ĉe la T.J.O.-filmservo kopiojn de la filmoj. Ludonante la kopiojn, vi ricevos la elspezojn por ili, kaj tiel ĉiu landa sekcio de T.J.O. povas fondi sian propran „filmservon”.

La T.J.O.-Filmservo Heerhugowaard D 89/Nederlando.

Nia trezorejo: S-ino M. en N. Y. (Usono): f 10,23; F-ino G. en L.: f 1,50; H. en de B.: f 2,50; H. F. en V.: f 1,50; H. S. en N. D.: f 1,—; J. K. en A.: f 0,50; F. M. en L.: f 0,50; N. N. en G.: f 2,75; H. S. en E.: f 7,50; (Ĉiuj en Nederl.); B. en C.: f 2,65; W. en B.: f 3,24; H. en B.: f 8,10; F-ino G. en N.: f 0,54; F-ino N. L. en B.: f 1,88; F-ino S. en B.: f 0,54; Y. en P.: f 1,08; F-ino C. en G.: f 0,54; F-ino D. en H.: f 0,54; S. en R.: f 0,54; T. en W.: f 1,88 (Ĉiuj en Britujo), sume f 49,56. (raporto de majo-septembro).

Ĝeamikoj, kiuj sekvos en la listo? Multaj eroj formas aron!

Neniu povas esti tiel sensignifa, ke lia influo ne utilis al iu.

E. M. K.

NIAJ KUNVENOJ.

Blankenberg (Belgujo) (2-5 aŭg):

La alveno.

Post bedaŭrindaj malfacilaĵoj ni finfine alvenas en Blankenberge, kie ni, post refreŝiga trinkado, serĉas la junulargastejon. Antaŭ la lernejo ni subite ekvidas du konatojn: Carlos kaj s-ro Debaene, kun bele vestita, blondhara junulo, kiu portas pezan valizon. Li estas Karl Erik Karlsson, nia sveda ĉefperanto. Ni eniras la lernejan parkon (prefere mi lernus tie anstataŭ en Bruselo!) kaj jen Esperantujo: la junulargastejo kun ĉirkaŭaĵo. Du tendoj jam staras. Ho! mi vidas malnovan konaton: Siem de Geus! Mi bone memoras lin, de nia renkontiĝo en Hilversum.

Nun Raymond kaj Berthe starigas la tendon kaj mi iom helpas Carlos ordigi la kongrespaperaĵojn (aŭ paperaĵojn). Bruĝanoj, kiujn mi ne konas, jam ĉeestas. Ili ŝajnas mutaj, komencantoj. Sed ilian mokridon mi bone komprenas, kiam mi post la kvara klopodo ankoraŭ ne sukcesis bruligi fajron. Helpeme ankaŭ ili provas kaj sukcesas.

Nun venas nederlandoj. Mi tuj rekonas s-inon v. Veenendaal kaj ankaŭ Henk kaj Hans kaj la strangan sed simpatian Petro Rulofido. Kia plezuro revidi ĉiujn amikojn!

Malgrable laboro komenciĝas: la distribuo de pajlo. Mi longtempe rememoros kiel mi rompis al mi la cerbon por dividi tiom malmulte da pajlo inter tiom lacegaj samideanoj. Kiel rezisti al maljunula plendo? Kiel rezisti al knabina rideto?

Francinoj alvenas. Ili vojaĝis vagonare ĝis Dunkerque kaj biciklis de tiu loko al Blankenberge. Mi jam konis s-inon Turin pere de korespondado, mi nun vidas ŝin, kaj baldaŭ, ravate, mi aŭdos ŝin!

La unua vespero finiĝas. Ĉiu estas laca kaj unue zorgas pri manĝado kaj dormado. Mia amiko Maertens prizorgas la manĝoservon. Mi opinias, ke neniu tion bedaŭras! Post laciga tago ni enlitiĝas, aŭ, pli prave, mi surligniĝas, kaj aŭdas de ĉiuj flankoj malbondezirojn al la pajlo-disdoninto.

En la nokto mi vekigiĝas. Ĉu flugmaŝino ronkas??? Ne — Viro! Mi turnas min kaj nenio plu

La lasta tago.

Post plene sukcesinta festeto ni iras al la kampfajro, pretigita

de Alain. Baldaŭ la flamoj torde supreniras al la ĉielo, la ligno kraketas, kantoj sonas. Kantoj en nia kara Zamenhofa lingvo, kiuj unuigas nin. Kantoj en la franca, nederlanda, angla lingvoj, kiuj pensigas nin pri la patrujo, pri niaj hejmoj, sed ankaŭ pri tiuj de niaj kamaradoj.

La kampfajro finiĝas sufiĉe frue. Oficiale la Internacia Konferenco de TJO finiĝis, sed ne eblas disiĝi. Grupoj staras. Adiaŭoj flustrigas malgaje. Kelkaj ŝajnas ĝojaj, sed oni klare vidas, ke tio estas nur perforta gajeco

La nokto estas mirinde bela. Mi ne volas enlitiĝi. Ankaŭ Petro Rulofido ne. Ni ekpromenas en la parko. Petro parolas. Mi respondas. Sed mia buŝo funkcias aŭtomate, ĉar la brilaj steloj kaj malhele lumigita ĉielo ŝutis en min pensojn pri ĉio, kion mi revidos, pensojn pri ĉio, kion mi forlasos, pensojn pri amatino, pri gepatroj, fratoj, geamikoj, pri Hans, Henk, Marcel kaj Manjo, Raymond kaj Berthe, pri la kunveno Ĉio ĉi moviĝas en mia cerbo senorde, kvazaŭ ŝutita el grandega sitelo. Kaj mi iĝas malgaja. Petro paroladas kaj kelkfoje mia spirito revenas teren. Fine li deklamas la esperanto-tradukon de „Ballade des Pendus” de Francois Villon. Mia cerbo kvietiĝas, ravata de la preĝo de tiu rabisto, kiu estis pli homa ol multaj el ni.

Ni revenas al la junulargastejo. Kelkaj TJO-anoj residiĝis ĉirkaŭ la fajro, kiun Alain revivigis. Dolĉaj, melankoliaj kantoj lulas nin Fakulo trovus erarojn, sed ĉi tie ĉio venas el la koro, kaj neniŭ atentis, neniŭ pripensas plu. Nur kantas dekkvin koroj

Jam estas la tria matene. Mi serĉas kovrilon kaj ekkuŝas sur la teron. Petro Rulofido deklamas „La violono de l’Cigano” Mi endormiĝas

Philippe Cullus (Belgujo).

Soesterberg, Nederlando (7-14 aŭg).

*„Malnovajn gekonatojn iam ĉu forgesu ni?
Ĉu tagojn la pasintajn ĉiam ne memoru ni?”*

Tiuj vortoj, tiom ofte de ni kantataj, certe validas por nia kunveno en Soesterberg, ĉar vere neforgeseblaj estas la tagoj, pasigitaj en tiom pure amikeca sfero. Kiom feliĉaj kaj liberaj ni migris en la belegaj arbaroj kaj erikejoj, ĉiam kantante kaj ludante, en plena harmonio.

Kia surprizo estis la neatendita alveno de niaj francaj geamikoj, kiuj post la kunveno en Blankenberge venis al Soesterberg!

Kiom interesa estis la „Skota Vespero”, kiam membroj de „The British Council” kaj de „British Information” venis al ni por montri filmojn pri Skotlando. Belegaj bildoj! Nemirinde ke inter ĉiuj ĉeestantoj ekestis la deziro: foje viziti tiun landon!

Skotaj geamikoj, ĉu eblos???

N. K.

Tiu, kiu perdis sian „LJV”-kantaron en Blankenberge skribu al Petro Rulofido, Schoolstr. 43, Diemen.

976 KILOMETROJ PO HORO.

Rapidecon de 976 kilometroj po horo atingis senhelica flugmaŝino provizita per du motoroj de kune pli ol 11000 ĉevalpovoj. Tiu lasta rapideca rekordo pliproksimigas nin al la tempo, kiam aviadilo povos vetflugi kun la suno; kiam, teorie, estos eble, eviti la nokton kaj vivi, en la flugmaŝino, dum eterna tago.

Esperantistojn la afero interesas precipe el tiu vidpunkto ke, ju pli rapide oni povas de unu loko en la mondo transportiĝi al alia loko, des pli urĝe sentiĝas la bezono de internacia lingvo.

El „Heroldo de Esperanto”.

Ligno kiel grupkotizo.

La malfacilaj cirkonstancoj en Hungarlando kaŭzas ke mono perdis sian valoron kaj regas nekredbla inflacio (= prezo-altiĝo). Tial la membroj de la grupo de Hungarlanda Esperanto-Societo en la urbo Gyula, anstataŭ per mono, pagas sian grupkotizon per ligno aŭ manĝaĵoj (ovoj, salo, faruno). Por jarabono je „Hungarlanda Stelo” (Adr. Dürer-nyomda, Gyula, Hungarujo) oni petas 72 foliojn da papero (leterformato).

P. B.

El „Heroldo de Esperanto”.

Rigardu malproksimen — vi ekvidos la malproksimon; rigardu la ĉielon — vi ekvidos la ĉielon; sed ekrigardante en etan spegulon — vi ekvidos nur vin.

Prutkov Kuzma (el „La Verda Flamo”).

Kursgvidantoj! Ne timigu viajn lernantojn per multekostaj kaj ofte tro malfacilaj lego-libroj! Uzu la binditajn jarkolektojn de „La Juna Vivo”! Ili enhavas abundon da legaĵo por komencantoj kaj progresintoj, ludojn, kantojn, ktp! Prezo f 1,— aŭ egalvaloro.



Apud la stalo, malantaŭ la domo estas sablo. Gracia ludas en ĝi; ŝi fosas per la manoj. „Atendu Gracia,” diras Luiza. Ŝi iras al la kuirejo kaj revenas kun ligna kulerlo kaj lada kovrilo. Post kelkaj momentoj aperas kvin tortoj. Ili estas belaj kaj bonaj; ili estas sablaj tortoj.

Gracia vendas. Luiza aĉetas; ŝi pagas per kelkaj biskvitoj kaj la malgranda vendistino estas tre kontenta.

Ramono revenas de la najbaroj kun malgranda sitelo. El liaj poŝoj venas blankaj ŝtonoj. Baldaŭ la sitelo estas plena. Nun Ramono estas vendisto.

„Ovoj! belaj blankaj ovojn! Kiu aĉetas?” krias la malgranda ovo-vendisto.

Luiza aĉetas; ankaŭ al li ŝi pagas per biskvitoj. Gracia aĉetas kaj ŝi pagas per sabla torto.

Patro kaj Felipo revenas de la montoj. Felipo sidas sur Blekemul: li iras per mulo. Patro ne rajdas, li iras per la piedoj. Ili iras al la ĝardeno. Baldaŭ Gracia sidas sur la ŝultroj de Patro.

„Mi bedaŭras, ke ne estas ludiloj por la infanoj,” diras Luiza.

„Ludiloj estas tre karaj, kaj la infanoj tamen ludas,” respondas Patro. Li vokas: „Ramono!” El lia poŝo venas libro kun belaj bildoj. „Jen estas lernilo por vi, Ramono,” li diras.

per

ni aŭdas per la orelo
ni iras per la piedoj

ni manĝas per la buŝo
ni vidas per la okulo.

la ilo

ni bala-as la bala-ilo
ĝi flug-as la flug-il-o
ni fos-as la fos-il-o
ni glad-as la glad-il-o
ni kovr-as la kovr-il-o

ni kudr-as la kudr-il-o
ni lern-as la lern-il-o
ni lud-as la lud-il-o
ni manĝ-as la manĝ-il-o
ni tranĉ-as la tranĉ-il-o

atend-u ni kovr-as
baldaŭ libr-o
mi bedaŭr-as la okul-o
biskvit-o la orel-o
ŝi fos-as ŝi pag-as


plen-a tamen
la poŝ-o tort-o
sabl-a tort-o la vendist-o
sitel-o la vendist-in-o
ŝton-o

Ekzerco. Enmetu: kun aŭ per: Anita ludas ... amikino. La sinjoro iras ... la sinjorino al Las Palmas. Ramono ludas ... sitelo. Luiza kaj Gracia dancas ... Jipi. Gracia ludas ... ligna kulero. Ni rajdas ... mulo al la vilaĝoj. La hundo saltas ... la piedoj.

Gramatika enhavo: la sufikso: il; la prepozicio: per; ripetado: kun.

Leciono 16.

LA BONAJ AĴOJ.



La suno subiras; la ĉielo estas ora. Sed la mallumo venas rapide, do Patro kaj la infanoj iras al la domo. Post kelkaj momentoj la ĉielo estas malluma. Unu post la alia aperas la steloj: ili brilas hele. Tu-tu! tu-tu! tu-tu-tu! Jen alvenas la aŭtobuso kun Patrino kaj Pablo. La veturilo veturas malrapide; nun ĝi haltas antaŭ la domo. Ili eliras rapide kun la pakaĵo: du korboj kaj sako. La ĝentil konduktoro helpas trankvile. La aŭtobuso veturas for kaj la Patrino kaj Pablo iras al la domo.

En la ĉambro brulas la petrol-lampo. La infanoj staras ĉirkaŭ la korboj: ili scias, ke bonaj aĵoj estas en ili. En unu korbo estas fiŝoj: tinoj. En la sako estas vestaĵoj: nova laboro por Patrino. La infanoj atendas trankvile. El la alia korbo venas ok oranĝoj, kvar citronoj kaj ses paperaj sakoj. En la sakoj estas faruno, rizo, sukero, salo, kakao kaj biskvitoj. Luiza iras al la ladaj skatoloj sur la breto. Post kelkaj momentoj la kakao estas en la kakaujo, la sukero en la sukerujo, la biskvitoj en la biskvitujo kaj la aliaj sakoj en la granda skatolo por diversaj varoj.

La infanoj atendas ankoraŭ. El la korbo venas malgranda sako kun dolĉaĵoj: sukeraĵoj kaj ĉokoladaj bombonoj. En la buŝoj malaperas kvin bombonoj; unu kuŝas sur la bufedo por Anita.

a — e

bel-a
bon-a

bel-e
bon-e

mal-bel-a
mal-bon-a

mal-bel-e
mal-bon-e

ĝentil-a	ĝentil-e	mal-ĝentil-a	mal-ĝentil-e
hel-a	hel-e	mal-hel-a	mal-hel-e
net-a	net-e	mal-net-a	mal-net-e
profund-a	profund-e	mal-profund-a	mal-profund-e
rapid-a	rapid-e	mal-rapid-a	mal-rapid-e
trankvil-a	trankvil-e	mal-trankvil-a	mal-trankvil-e

La knabino estas bona. La bona knabino laboras bone.

La knabo estas rapida. La rapida knabo iras rapide.

La konduktoro estas trankvila. La trankvila konduktoro helpas trankvile.

la aĵo.

ni manĝ-as	la manĝ-aĵ-o	dolĉ-a	la dolĉ-aĵ-o
ni pak-as	la pak-aĵ-o	fiŝ-o	la fiŝ-aĵ-o
ni trink-as	la trink-aĵ-o	frukt-o	la frukt-aĵ-o
ni vest-as	la vest-aĵ-o	suker-o	la suker-aĵ-o
ĝi al-ven-as	ĉokolad-o	la labor-o	la sak-o
la aŭtobus-o	divers-a	lum-a	ili sci-as
la biskvit-uj-o	do	mal-lum-a	la stel-o
bombon-o	ili el-ir-as	mal-lum-o	ĝi sub-ir-as
ĝi brul-as	la farun-o	nov-a	la suker-uj-o
citron-o	kaka-o	or-a	tin-o
la ĉiel-o	la kaka-uj-o	orangĝ-o	la var-o
ĉokolad-o	la konduktor-o	riz-o	ĝi vetur-as
			la vetur-il-o

Gramatika enhavo: la adverbo (ĉe verbo) e; la sufikso aĵ; ripetado il-uj.

Korekto en la 13-a leciono: Novana d. e. Novano (4-a linio de supre).

En la gramatika enhavo oni metu post a-aj: as-u.

En la ekzerco de la 14-a leciono staras: la bluj violoj; oni legu: floroj.

POR KOMENCANTOJ.

La bestoj (verkaĵeto de nia plej juna anino).

La bestoj estas grandaj kaj malgrandaj. Kato, leono, tigo, bovo, bovino, koko, kokino, ĉevalo, estas bestoj. Kato estas nigra, aŭ blanka, aŭ griza kaj havas longan voston. Leono estas granda besto. Ĝi havas sovaĝajn okulojn. Tigo estas granda. Kaj bovino estas granda. Ĝi donas lakton. Ĝi estas blanka kun nigraj makuloj. Koko estas malgranda. Ĝi havas belan voston kaj malgrandajn okulojn. Kokino estas pli malgranda ol koko. Ĝi havas ankaŭ mal-

grandajn okulojn. Ĉevalo estas granda besto. Ĝi estas blanka, aŭ bruna, aŭ nigra. Ĝi havas grandajn okulojn kaj longan voston.

Coba Sassen (9-jara), Limmen.

Gvidantoj de infangrupoj instigu siajn infanojn fari verkaĵojn por nia rubriko „Por Komencantoj”. Ni ĉiel instigu la junularon, ke ĝi mem ekverku por sia gazeto!

Atento.

Knabo venas tro malfrue al la lernejo.

La instruisto estas kolera, kaj diras: „Kial vi venas tiom malfrue?”

La knabo diras: „Tie ĉe la angulo de la strato oni konstruas domon. Kiam mi preterpasis, oni ĵus levis brikojn supren. Kaj laboristo kriis al mi: „Atentu!”

La instruisto: „Nu, kaj kio plu?”

La knabo: „Nu, mi atentis!”

Respondu al jenaj demandoj: Kie la knabo alvenis? Ĉu li alvenis frue? Ĉu la instruisto estis gaja? Kia estis la instruisto? Kion li diris? Kio okazis ĉe la angulo de la strato? Kiu tie preterpasis? Kion oni levis supren? Kion kriis la laboristo? Ĉu la knabo atentis?

La kontraŭo.

Barono jam frue en la mateno eliris por promeni en la kamparo.

Li renkontis almozulon, kiu diris al li: „Bonan tagon, sinjoro! Kiom frue vi promenas!”

„Jes,” respondis la barono, „mi devas promeni por trovi apetiton por mia matenmanĝo. Kaj vi, kion vi faras?”

„Mi faras ĝuste la kontraŭon: mi serĉas matenmanĝon por mia apetito!”

Respondu al jenaj demandoj: Kiu promenis? Kiam la barono promenis? Kie li promenis? Kiu ankaŭ estis en la kamparo? Kion diris la almozulo? Kial la barono promenis? Kaj kial promenis la almozulo?

Bona Kialo.

Sonjo senespere ploregas: ŝia hundeto mortis.

Amikino de ŝia patrino penas konsoli ŝin: „Kion fari? Ĉiu en la mondo ja iam devas sperti malfeliĉon. Pripensu, mi antaŭ ne-longe perdis mian karan avinon!”

„Estas bedaŭrinde,” diras Sonjo, „Sed vi ne prizorgis vian avinon ek de ŝia naskiĝo, kiel mi mian hundeton!”

El „La Verda Flamo”.

Rakontu la enhavon per propraj vortoj.

La rapideco de la birdoj.

Kiu birdo estas la plej rapida? Ne estas la aglo, kvankam oni nomas ĝin „la reĝo de la aero”. Ankaŭ ne la lerta kaj rapida hirundo. Aglo kaj hirundo flugas nur 45 km. po horo. Pli rapida estas la vojaĝkolombo, kiu povas atingi rapidecon de 72 km. po horo. Ŝajne perdriko flugas malfacile, kelkfoje ĝi preskaŭ tuŝas la teron. Tamen ĝi povas flugi rapidege, eĉ 80 km. po horo. Ankorau pli rapida estas la falko. Ĝia rapideco estas 95 km. po horo. Tamen ĝi ne havas la rekordon. La plej rapida birdo estas la sovaĝa anaso. Tiu birdo povas dum kelkaj momentoj flugi kun rapideco de 135 km. po horo. Kaj dum longaj distancoj ĝi facile povas daŭrigi rapidecon de 122 km. po horo.

Laŭ „Tra la Mondo”.

Ruzulo.

Sinjoro devis iri al la stacidomo. Li portis pezan kofron. Subite li vidis aŭtomobilon. Li diris al la ŝoforo: „Kiom mi devas pagi, se mi veturos kun vi al la urbo?”

„Kvin frankojn” estis la respondo.

„Kaj por mia kofro?” reiris la sinjoro.

Ŝoforo: „Ho, por la kofro mi postulas nenion.”

Sinjoro: „Tre bone! Bonvolu do transporti mian kofron al la stacidomo. Mi venos piede.”

Respondu al jenaj demandoj: Kien iris la sinjoro? Kion li portis? Kia estis la kofro? Kiu portis la kofron? Kion vidis la sinjoro? Ĉu estis ŝoforo en la aŭtomobilo? Kion demandis la sinjoro? Kiom da mono postulis la ŝoforo? Ĉu la sinjoro iris en la aŭtomobilon? Kio okazis?

Nia Kampado en Soesterberg.

Je la oka horo nia grupo forveturis kaj ni alvenis tagmeze. Unue ni iris al la dormejo kaj preparis niajn litojn. La knaboj dormis en „De Kolder” kaj la knabinoj en „De Klep”.

Jaŭde ni faris promenadon al la Belga Monumento. La ĉirkaŭaĵo estis bela. Vendrede ni iris al Aŭsterlitz. Estis longa promonado. Lundvespere ni iris al Soesterberg por vidi skotlandajn filmojn. Tre belaj filmoj. Ni ankoraŭ faris multajn promenadojn kaj la Esperanto-kantoj sonis tra la aero. Pluvis iomete, sed la vetero estis sufiĉe bona. Kaj merkrede ni enpakis la dorsosakojn kaj je la unua ni foriris per la tramo kaj poste por la vagonaro kaj en Amsterdam ni adiaŭis unu la alian.

Jan v. d. Oord (12-jara), ano de „La Junaj Migrantoj” en Halfweg.

GENERALAJ SCIIGOJ.

Aŭstrio: La aŭstria ministro por Instruado allasis Esperanton kiel instruobjekton en ĉiuj lernejoj. — Post nelonge aperos „Aŭstria Esperantisto”. — Aperis nova lernolibro „Freude durch Esperanto”, kaj poŝvortaro Esperanta-germana kaj germana-esperanta.

Belgujo: La Nacia Radio-Instituto disaŭdigis ekde oktobro venonta ĉiusemajne favore al Esperanto. Dum ĉiu sabata posttagmezo de la monato oktobro propaganda parolado en la nederlanda lingvo preparos la terenon por la elementa radiokurso kiu komenciĝos la 1-an de novembro.

La XI-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista en sia ĝenerala kunveno de la 9-a de junio 1946-a:

- 1-e. esprimas la deziron ke la neŭtralaj internaciaj Esperanto-Asocioj senprokraste kaj en reciproka toleremo pristudu la eventualan reunuiĝon de la neŭtrala int. Esperanto-Movado.
- 2-e. esprimas la esperon ke tiu de ĉiuj sopirata unueco efektiviĝos plejlaste okaze de la unua postmilita Universala Kongreso.
- 3-e. instigas ĉiujn internaciajn Esp. Aociojn, neŭtralajn aŭ neneŭtralajn, pristudi senprokraste la starigon de tutmonda Esperanto- instanco kiu reprezentos ĉiujn esperantistojn senescepte.
- 4-e. decidis komuniki tiujn deziresprimojn al la Esperanto-Gazetaro por ke ili veku ĝeneralajn atenton kaj simpation.

Bulgarujo: Ĉe la Sofia ĉefstacidomo estas gvidata speciala Esperanto-kurso por fervoĵistoj. Ankaŭ por tramistoj oni aranĝis specialan kurson.

Ĉeĥoslovakujo: Esperanto-Instruo estas permesata en Komercaj Lernejoj kiel laŭvola fako.

Esperanto en la dana radio! Bedaŭrinde ni ricevis la anoncon pri la disaŭdigo je la 22-a de aŭgusto tro malfrue por publikigi ĝin en la antaŭa No. de „LJV”. Ni tamen insiste petas tiujn, kiuj aŭdis la elsendon raporti pri ĝi al „Statsradiofonien, Kopenhago”. Verŝajne la nombro da raportoj estos decidiga por estontaj elsendoj, do estas tre grave, ke kiom eble plej multaj raportoj envenu! Danku al la stacio, eĉ se vi ne aŭskultis!

Germanujo: Kvankam la Esperanto-movado jam de jaroj estis haltigita la flamo ankoraŭ bruletis kaj longatempe antaŭ ol la unuaj germanlingvaj gazetoj aperis, iu esperplena samideano surgluis sur murojn de ruinoj en München aŭŝojn kun la teksto: „Kiu parolas Esperanton?” Tio estis sukcesa. Kelkaj samideanoj, kiuj antaŭe eĉ ne vidis unu la alian, sin anoncis kaj decidis kolekti ĉiujn malnovajn esperantistojn por fondi novan grupon kaj revivigi la movadon en Germanujo.

Loĝante en la regiono okupata de la Usona militista aŭtoritato, ili kun sukceso petis permeson starigi Esperantistan grupon. Intertempe aperis germanlingvaj gazetoj, kaj per ilia helpo kaj per la helpo de radio München, ili invitis samideanojn sin anonci ĉe la prezidanto. La unuan publikan kunvenon de la grupo en München (20-1-'46) ĉeestis 250 samideanoj el diversaj lokoj de Sudgermanujo. Eĉ eksterlandanoj partoprenis. En tiu kunveno oni decidis esti tute neŭtrala rilate al politikaj aŭ relegiaj tendencoj, kaj dediĉi la tutan energion al komunaj celoj, nome, instruado de Esperanto, uzado kaj disvastigado de la lingvo kaj disvastigado de pacaj idealoj pere de Esperanto. Laŭ „Esperanto-Internacia”.

Hungarujo: Hungara Esperantista Societo Laborista, kiu en 1933 pro politikaj kaŭzoj devis ĉesi la agadon, refondiĝis.

Fondiĝis grava Esperanto-Sekcio en la Budapeŝta Polica Societo. Centoj da policanoj anoncis sin por kurso.

Japanujo: Kun plezuro ni eksciis, ke la japana Esperanto-Instituto, ĉefa organo esperantista en Japanujo, bone travivis la militon kaj ke ĝi organizis la 32-an japanan Esperanto-Kongreson en Tokio je la 16a de septembro, 1945. Ree aperas „La Revuo Orienta”.

La socialdemokrata partio de Japanujo (Nippon Syakaito), kiu atingis la duan lokon inter la partioj, metis en sian programon la „enkondukon de Esperanto kiel internacia lingvo”.

Alia japana organizo, fondita post la milito, la „Instituto por Paco Porĉiama”, decidis uzi Esperanton paralele kun la angla lingvo por publikigi siajn raportojn eksterlande. La Instituto jam organizis Esperanto-kurson por siaj oficistoj kaj membroj.

Laŭ „Amerika Esperantisto”.

Jugoslavujo: Fondiĝis Kroata Esperanto-Ligo kun ĉ. 500 membroj. En Zagreb estis gvidataj 9 paralelaj kursoj kun 350 partoprenantoj.

RICEVITAJ ESPERANTAJOJ.

Kie loĝas Esperantistoj en Nederlando? Landkarto de Nederlando 36 × 43 cm. Eld. H. G. Magel, Voorbeek 6, Aalst Waalre, Ned. Prezo 6 resp. kup. — La urboj aŭ vilaĝoj kie troviĝas esperantistoj estas indikitaj per verdaj steletoj. Bedaŭrinde la karto estas ne-kompleta. Esperantistoj, loĝantaj en ne-indikitaj lokoj sciigu tion al la eldonisto! La intenco estas desegni kartojn ankaŭ de aliaj landoj.

„Fulmo”-Kalendaro. Eld. V. T. Inglis, 21 Lynmouth Rd., Bristol 3, Britujo. La kalendaro estas aplikebla al la jarcentoj de la nuna epoko. — Prezo ne indikita.

„La trovita feliĉo” verkita de Tibor Sekelj. 20-paĝa libreto, enhavanta iom misteran rakonton. Eld. de „Progreso” en Buenos Aires Prezo 2 respondkuponoj.

„La malbona suvereno”, verkita de H. C. Andersen, trad. de H. P. Frodelund. Eldono de la tradukinto. Lisemindevej 4, Odense, Danujo. Prezo: 1 resp. kupono. — Pro forlaso de la cirkumfleksoj kaj la uzado de la literoj x en w la fabelo estas malfacile legebla.

„La virineto en bluo kaj aliaj rakontoj”, verkita originale de Mason Stuttard. Jen la 8-a libro en la „Epoko”-serio, jam bone konata de antaŭ la milito. (Bone prizorgata eldono de „The Esperanto Publishing Co. Ltd., Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo). 150-paĝa broŝurita libro, enhavanta 13 rakontojn. Mendebila ĉe T.J.O.-Centro. Prezo, frankite, f 1,75.

„Pri la religia societo de amikoj (kvakeroj) kaj ĝia servado en diversaj landoj”. Propagandbroŝureto. Broŝuron pri la principoj kaj agado de la Kvakera Esperantista Societo oni kontraŭ unu respondkupono povas peti de la sekr. J. T. Harrod, Green Maze, Godalming, Surrey, Britujo.

KORESPONDADRESOJ.

Britujo: Mi deziras korespondi kun la tuta mondo. J. F. Charlton, Broadgate Rd., Weston Hills, Spalding, Lincs.

Ĉeĥoslovakujo: 18-j. tanisto Vítězslav Pečinka el Bařov 332, dez. kor. pri ĉiuj temoj, speciale pri sporto kaj vojaĝo.

12-j. lernanto, Jidřich Krajĉa, Bařov 687, dez. kor. pri sporto kaj skoltismo.

24-j. komerckorespondantino, Jořka Ĉapková, Bařov, Prumyslova ŝkola fy Bata, dez. kor. pri literaturo, sporto kaj vojaĝo, prefere kun nederlandanoj, svedoj, amerikanoj kaj rusoj.

23-j. desegnistino, Marie Procházková, Bařov 909, dez. kor. prefere kun angloj kaj svisoj pri ĉiuj temoj.

Nederlando: S-ro Eduard Rademakers (instruisto) Tivoliweg 21, Hulst (Z) dez. kor. kun la tuta mondo; interŝanĝas poŝtmarkojn.

Jaap Ensink, 25-j. studento pri orientaj lingvoj, dez. kor. kun Tajlandanoj. Adr: Bern. de Waalstr. 13, Zuilen (U).

Janny Broekhuis, 16-j. knabino dez. kor. kun komencantoj. Adr: „Espero“, West-Grafftdijk (NH).

Svedujo: Dudek geknaboj deziras korespondi per bildkartoj. Grupa adreso: Junulara Grupo „La Falkido“, poŝtfako 16, Skövde. Ni certe respondos!

M.E.B.-Serioj estas ankoraŭ aĉeteblaj! Tuta serio de 10 ekz. f 2,50; unuopaj ekz. f 0,35. Ĉiu malnova esperantisto memoros la belaspektajn libretojn, kiuj antaŭ la milito aperis en M.E.B., sub la redaktado de J. Glück, T. Jung, kaj J. H. J. Willems. En la unua serio i.a. aperis: „La grandaj filozofoj kaj la universala lingvo“ de J. Glück, (No. 1) „Kongresaj paroladoj“ de d.ro Zamenhof (Noj. 6-7); De Muheddin ĝis Mundilatin“, mondlingvaj projektoj tra la jarcentoj, de Th. Jung (No. 3); „Rusaj Noveloj“ (No. 2). Menu la libretojn ĉe TJO-Centro, West-Grafftdyk.

FINFINE

Ni ricevis novan kvanton **da poŝtpapero** kun la (iom ŝanĝita) TJO-emblemo.

Prezo: 50 kovertoj kaj 50 leterfolioj (granda formato): f 2.—.

TJO-Glumarko!

Ĉu vi jam mendis la noveldonitan TJO-Glumarkon?

Se ne, baldaŭ faru! Ĉiu TJO-ano nepre ornamu siajn korespondaĵojn per la bela propagandilo!!!

Prezo: 100 ekz. f 0.75.

50 ekz. f 0.40 (aŭ egalvaloro).

LEERT ESPERANTO. Arte desegnita reklamafiŝo (35 × 50 cm). Tre taŭga propagandilo por ornami viajn fenestrojn dum „la verda monato“. Klara verda preso sur neŭtrala fono kun modestaj simboloj pri la moderna tekniko kaj komunikiloj kiuj interligas la homojn de la tuta mondo. Vera artaĵo!

Prezo: f 0,30. 10 ekz. por f 2,50 (aŭ egalvaloro).